

PROMENADO INTER LA MONUMENTOJ

ESTU BONVENA EN LA MONUMENTRIĈA URBO ALKMAAR!

En la jarcentojn aĝa koro de Alkmaar oni povas admiri ĉirkaŭ 400 monumentojn.

Dum tiu ĉi promonado en proksimume unu horo kaj duono vi akiros impreson de la intima alkmaro etoso, ĉe kio ni precipe atentis la detalojn. La itinero kondukas laŭ pormaljunulaj dometoj, muzeoj, fasadoj, historiarikaj domoj, kaj ĝi komenciĝas kaj finiĝas sur "Waagplein" (Pesilejplaco).

Ni deziras al vi agrablan promenadon!

NI KOMENCAS LA PROMENADON SUR "WAAGPLEIN", ĈE "WAAGGEBOUW" (Pesilejo)[1].

En la tuta mondo Alkmaar estas konata kiel fromaĝurbo. Ekde la unua vendredo en aprilo ĝis inkluzive la unua vendredo en septembro okazas sur "Waagplein" (Pesilejplaco) la fromaĝfoiro [1]. Depost 1365 oni pesas fromaĝon en Alkmaar. La unua publika foiro okazis en 1622. Dum la fromaĝfoiro oni rajtas ekde la 7.00a horo, alporti la fromaĝojn al la foiro. La foirestro ĉeestas je tiu tempo por montri al liverantoj iliajn lokojn.

Vendredmatene je la deka precize, la orflavaj fromaĝoj en longaj vicoj kuŝas elmontritaj sur la placo, kaj jam venas la aĉetontoj, kiuj provas la kvaliton, elborante pecon el kelkaj ekzempleroj. Sekvas la marĉandado ĝis fine la aĉeto per manfrapo estas efektivigita. Oni notas sur nigran tabulon la plej altan konsentitan prezon. Jen la momento por ekaktivado de la fama fromaĝportista korporacio (gildo). Ĉiu el la kvar grupoj, nome la verda, la blua, la ruĝa kaj la flava, konsistas el ses portistoj kun unu monsakulo. Oni rekonas la grupojn laŭ la koloro de iliaj pajloĉapeloj kaj ankaŭ laŭ la koloro de la portiloj. Ankoraŭ ĉiam oni uzas la malnovan regularon kaj plenumas la malnovajn tradiciojn. Tiel oni nomas la estron kun la oranĝa ĉapelo "paps" (paĉjo). Portistoj kiuj venas tro malfrue, ricevas de li monpunon.

"Waaggebouw" (Pesila domo) estis konstruita en la jaro 1390 kaj origine servis kiel Sankta Spiritogastejo por malriĉaj vojaĝantoj. Ankaŭ oni flegis malsanulojn. En 1557 oni bezonis pli da spaco por la foiro. Interkonsente kun la ĉirkaŭloĝantoj, kiuj pagis parton de la kostoj, oni konstruis ligita al la Sankta Spiritohospitalo la pesilejhalon. En 1567 oni destinis la hospitalon kiel pesildomon. Tiu alikonstruado estis preta en 1582. Tiu historia dato troviĝas sur la norda fasado. Ni rekonas la preĝejdestinon laŭ la grandaj ogivaj (gotikaj) fenestroj en la muroj. La turo similanta la turon de Malnova Preĝejo en Amsterdam, konstruiĝis dum la fino de la 16a jarcento (preta en 1599). En ĝi pendas 17-jarcenta sonorilaro, farita de Antverpenano nomita Melhior de Haze. Rimarkinda estas la mekanaĵo sur la orienta flanko de la turo, "La Rajdistoj". Je ĉiu plena horo,

klarionisto levas sian klarionon kaj trumpetadas. Sub liaj piedoj samtempe du pordetoj malfermiĝas kaj malgrandaj kavaliroj aperas kaj prezentadas turniron. Fronte sur la konstruaĵo (orientflanke) troviĝas la surskribo: "S.P.Q.A. Restituit Virtus Ablatae Jura Bilancis", kio signifas: Heroeco kaj Forteco redonis al la estraro kaj la civitanoj de Alkmaar la iam perditajn pesrajtojn. La subskribo estis fiksita kiel memoro al la fakto ke la Alkmaranoj defendis sin kun sukceso kontraŭ la hispanaj sieĝantoj kaj ili ricevis la pesilrajton pro tio. En la jaro 1712 oni surmetis la tiel nomatajn montritabulojn kun diversaj subskriboj. Unu el ili, al la norda parto estas "Vive memor lethi, fugit hora" kio signifas: "Memoru morti, la horoj rapidas." En la pasinta tempo ne estis tiel granda placo kiel hodiaŭ. En la 17a jarcento la pesilejo estis ĉirkaŭita de malgrandaj domoj, en kio estis ĉiaspecaj butikoj kaj entreprenoj. En 200 jaroj pligrandiĝis la placo ok foje ĝis la hodiaŭa areo.

En "Waaggebouw" (Pesildomo aŭ pesilejo) estas sur la teretaĝo la oficejo de "V.V.V." (Unuiĝo por fremdultrafiko). En la unua kaj la dua etaĝoj troviĝas la holanda fromaĝmuzeo [2]. Ĉi tie estas konstanta ekspozicio de malmodernaj iloj kaj instrumentoj. La muzeo montras superrigardon pri la historio de la farado de laktaĵoj kaj la komerco en laktaĵoj. Ankaŭ estas tie kolekto de pentraĵoj el la 16a jarcento pri virinaj kaj lokaj kostumoj.

Vidinte ĉi ĉion, ni iras trans "Schapenbrug" (Ŝafponto) ĉe la fino de la placo kaj ni venos sur "Voordam" (Antaŭbaraĵo). Tio estis en la antaŭa tempo unu el la plej malnovaj akvofluejoj de Alkmaar. Ni iras maldekstren. Transe ni vidas la nacian biermuzeon "De Boom" (La Arbo) [3], rekonebla pro la murpentraĵo. La domo estas eks-bierfarejo el la 17a jarcento. En la muzeo oni akiras superrigardon pri la historio de la biero en Nederlando kaj Alkmaar. Ankaŭ ĝi donas impreson pri la bierfarado en antaŭaj tempoj. En la kelo de la muzeo troviĝas drinkejo, kie oni povas elekti el 86 specoj de nederlanda biero.

Ni iru dekstren sur "Dijk" (Digo). Tiu digo estis aranĝita kiel enirejo al "Slot Torenburg" (Turkastelo), kiu estis konstruita en la 11a aŭ 12a jarcento sub aŭspicio de unu el la grafoj de Holando. La kastelo estis jam malkonstruita en la 14a jarcento. Nur la stratnomo memorigas nin pri tio. Sur "Dijk" estis tenataj dum multjarcentoj, brutfoiroj. Prenu la duan straton dekstren, "Kooltuin" (Brasikĝardeno) [4]. Tiu ĉi kanaletoj estis en la pasinta tempo la legomĝardeno de "Slot Torenburg".

Ĉe la fino de "Kooltuin" ni iru dekstren kaj sur la ponto ni havas elvidon al malantaŭaj fasadoj [5] de kelkaj belaj domoj kaj ankaŭ al la plej bela flanko de "Waaggebouw". La dekstra domo transe de la ponto estas "Huis met de kogel" (Domo kun kuglego) [5a]. En 1573, dum la sieĝo de Alkmaar fare de hispanoj, Alkmaar estis pafita de la hispanaj kanonoj. Kuglego

zumis tra la fenestro de la domo de la korbfaristo Jan Arendszoon (unu el la unuaj subĉielaj predikistoj de Nederlando). Seĝo, sur kio sidis knabino kiu laboris per radŝpino, estis frakasita. Neniu el la sep ĉeestantoj estis vundita. Memore pri tiu miraklo oni fiksas la kuglegon sur la fasadon.

Iru nun rekte antaŭen en "Appelsteeg" (Pomo-strateto) kaj poste ĉe la fino maldekstren. Ni promenas nun en "Fnidsen". La nomo estas degenerado de la vorto 'Venecio'. La nomo devenas el la komercado kun Venecio. En tiu mallarĝa strateto troviĝas multaj historiaj domoj. Kelkcentmetrojn pli fore, dekstraflanke malantaŭ la domoj numeroj 35 ĝis 39, troviĝas la remonstranta preĝejo, kaŝita preĝejo el la jaro 1658 [6]. Tiu ĉi preĝejo estas kaŝita malantaŭ la ligna pordego kun la el forĝita fero farita barilo kun la literoj R kaj K. Origine ĝi estis grenejo. La preĝejo havas belegan internon, kun ligna barelvolbaĵo kaj galerioj ĉirkaŭe. Ankoraŭ hodiaŭ oni ĵetkovras la pinlignan plankon per dunsablo.

Ni promenas plue tra "Fnidsen" kaj iras dekstren en "St. Annastraat" [7]. Ĉi tie ni vidas imponan parton de urba renovigo. Ni vidas tion ankaŭ kiam ni promenas maldekstren en "Keizerstraat". La nomo devenas de la unua loĝanto de tiu strato iu Hendrik P. Keyser (1590). La strato finas ĉe "Bierkade" (Bierkajo) apud la "Nordholanda kanalo".

Iru maldekstren. Post ĉirkaŭ 25 metroj, je numero 10, ni trovas la nederlandan fornomuzeon [8]. La muzeo montras superrigardon pri la evoluado kiun la forno travivis.

En la muzeo staras 75 fornoj el la periodo de 1900 ĝis hodiaŭ. La monumenteca domego datiĝas de 1716 kaj enhavis la bierfarejon "De Burg".

Post eventuala vizito de la fornomuzeo ni iras dekstren (returnen) en la direkto de "Accijnstorentje" (Imposturo) [9]. Tiu ĉi malgranda konstruaĵo estis konstruita en 1622. Iam ĝi estis kontoro de la impostisto pri importoj kaj eksportoj de komercaĵoj per boatoj. En 1924, sekve de pliampleksiĝo de la trafiko, oni plilarĝigis "Bierkade". La turo malpermesis tion kaj tial oni forrulis la turon kvar metrojn; rimarkeble estis ke dum tiu rulado la turhorloĝo eĉ ne unu minuton haltis. Nun la turo estas la oficejo de la havenestro.

Ni iras plue kaj ni promenas dekstren al "Verdrunkenoord" (Dronitejo), ni elektas la flankon de domnumero 5. La kanalo ekestis en la komenco de la 16a jarcento. Ne malproksime de la unua ponto, je domnumero 45, ni trovas monumenton el la 17a jarcento, "Vigilantie"[10]. En 1916 la urbestro decidis aĉeti la magazenojn kontraŭ 4000 guldenoj. La stato estis abomena. Kvindek jarojn poste, en 1966, oni komencis restaŭri ĝin. Bela fasado, meze la pordoj antaŭ la etaĝoj. Flanke de la fasadokolo troviĝas ornamaĵoj kun diversaj fruktoj. Supre tri vazoj. Ofte la

fasado montras la enhavon de la magazeno. Tie ĉi oni konservis verŝajne tropikajn produktojn.

Ni promenas laŭlonge de la kanalo. Ĉe la fino ni vidas "Platte Stenenbrug" (Plata Ŝtona ponto) kun malantaŭ tiu la "Vismarkt" (Fiŝfoiro)[11]. En antaŭaj tempoj tiu foiro situis apud 'alirebla akvo' kaj oni alportis la fiŝojn rekte per boato. La verdaj arkformaj pordoj en la muro kanalflanke faris aliron al lignaj albordiĝejoj ĉe kiuj la boatoj albordiĝis. Sur la tegmento de la galerio staras dekstre kaj maldekstre la statuetoj de fiŝisto kaj fiŝvendistino.

Ni iru maldekstren al "Kapelsteeg" (Kapelostrateto). Ĉe la fino de tiu strateto je la angulo ĉe "Laat" estas "Kapelkerk" (Kapelkirko)[12], kiu estis fondita ĉirkaŭ 1500. Post brulego en 1760 restis nur la kvar muroj. Unu jaron poste, alkmara civitanino donacis novan katedron kiel dankon, ĉar ŝia domo, tuj apud la kirko, restis netuŝita.

Ni eniras maldekstren en "Laat" (tio signifas: fosita akvofluejo). Tiu ĉi butikstrato estis ĝis 1760 kanalo. Ni eniras la duan straton dekstren, "Keetgracht" (Salofarejo-kanalo). Nomita laŭ la salofarejoj kiuj estis ĉi tie en la pasinteco. Maldekstre situas la "Stads-timmerwerf" (Urba Ŝipkonstruejo) [13]. Verŝajne en 1726 jam ekzistis, sur terpeco, parto de la ŝipkonstruejo. Nun tio estas la oficejo por la urba konstruado. La dekstra fasado montras viglan stilon de 18a jarcento. Interese por scii estas ke la katedro en Kapelkirko, jam antaŭe menciita, estis farita en tiu ĉi ŝipkonstruejo. Trans la ponto super "Oudegracht" (Malnova kanalo) ni daŭrigas la vojon en la samdirekta daŭrigo de "Keetgracht" kaj jen ni atingas "Wildemanshofje" (Korteto de Vildeman) [14]. Enirinte ni estas en trankvila sfero. Dek naŭ multgaĝaj virinoj loĝas tie ĉi. La statuo montras Gerrit Floriszoon Wildeman, la fondinton. Post sia morto en 1702, Gerrit postlasis sian kapitalon grandparte al la urbo, kondiĉe ke oni konstruu tian ĉi korteton. La statuoj flanke de la enirejo estas simboloj de "Bezono kaj Maljunaĝo". (Wildeman estas stranga nomo; ĝi signifas "Sovaĝulo"). En la korteto estas kvazaŭ la tempo haltas, tamen nun loĝas ĉi tie nur izolaj sinjorinoj kiuj plejparte estas nek multgaĝaj, nek senhavaj.

El tiu ĉi oazo ni reiras al la strata bruo. Maldekstre kaj post 100 metroj vidiĝas "Luterana Kirko" [15]. Simpla rektangula konstruaĵo el 1692. La altajn fenestrojn oni aldonis en la 19a jarcento.

Ĉe la luterana kirko ni iras maldekstren al "Baangracht" [16]. La nomo devenas de iamaj ŝnurfarejoj. Ili ekzistis jam en 1572 kaj malaperis en 1871. La ŝnurfarejoj estis sur la loko de la hodiaŭa "Kennemerpark". Ni surgrimpas la ŝtuparon kaj veninte supre ni iru dekstren kaj sekvu maldekstren la piedvojeton al Kennemerpark.

Nun ni promenas supre sur "Bolwerk" (Remparo)[17], la restaĵo de la malnovaj urbaj bastionoj. Tiuj ĉi

bastionoj estas agrabla verda bufro inter la malnova urba centro kaj la 'moderna' periferia kvartalo kiu ekestis ĉirkaŭ 1880.

Oni konstruigis la bastionon en la jaro 1562. Ĉirkaŭ la urbo kuŝis ŝtona remparo, plifortigita per sablo. En la remparo estis masonitaj 12 rondaj kaj duonrondaj turoj. Tiam Alkmaar havis 5 pordegojn. Hodiaŭ preskaŭ nenio de ili restas.

Ni transpasas "Zilverstraat" (Argentostrato) kaj daŭrigas nian promenadon laŭ la piedvojetoj de la bastiono.

Je la fino vi vidas muelejon "De Groot". La Alkmaranoj nomas tiun muelejon "La muelejo de Piet" (elparolu: Pit)[18]. En la fortika tempo Alkmaron ĉirkaŭis muregoj. Sur multaj el tiuj remparoj oni konstruigis muelejojn. Kiam oni malkonstruis la pordegojn, kaj la ebenigitaj remparoj ŝanĝiĝis en parkojn, ankaŭ venis la fino de muelejoj. Unu tamen restis apud hejloa ponto. La nomo "De molen van Piet" (La muelejo de Pit) rilatas al konata muelista familio, kiu jam de tre longa tempo loĝas kaj laboras en la muelejo. Antaŭe sur la sama loko staris muelejo entute turnebla. Meze en la 18a jarcento oni anstataŭigis ĝin per brika muelejo kun turnebla supra parto (la tegmento).

Ni iras dekstren en "Ritsevoort". La nomo datiĝas el la tempo kiam ĝi ankoraŭ estis akvofluo. Je nia maldestra flanko ni preterpasas "Vrouwenstraat" (Virinstrato). Tie havis en antaŭaj tempoj, la facilmoraj virinoj siajn labordometojn.

Iomete plu, "Ritsevoort" domnumero 2 ĉe la angulo de "Lindengracht" (Tiliokanalo) ni trovas korteton, kiu nomiĝas "Hofje van Splinter" (Korteto de Splinter)[19], el 1646. La donacinto estis Margaretha Splinter. Oni konstruis la korteton por ok fraŭlinoj el la pli bonaj klasoj kiuj estis reduktitaj al almozuleco. Malantaŭ la verda pordo vi trovas iun, per ligna barelvolbaĵo kovritan strateton. Por enveni en la korteton vi devas trapasi koridoreton, poste vi malfermos duan pordon kaj jen ĝi estas. Ne timu, faru tion senĝene.

Returne ekstren ni iras maldekstren transe de "Lindengracht", ni sekvas la akvofluon ĝis ni venos sur la promenojeto de "Veste". Nun ni iras dekstren. Kie la vojeto disforkiĝas ni elektas la maldekstran vojeton. Ĉe via dekstra flanko vi vidas la enirpordon de la antaŭa glacikelo. Tiu ĉi glacikelo estis ĝis 1825 pulvo-deponejo de la armeo. Post tio ĝi funkciis kiel malvarmiga ŝranko de la lokaj kukbakistoj kaj malsanulejoj. Vintre oni segis la glaciajn blokojn el la glacia surfaso de "Singel" la ĉirkaŭurba kanalo.

Ĉe la fino de la vojeto dekstren kaj tuj maldekstren, jen ni estas en "Kanisstraat", kie staras la domo de "Unuiĝo de Farbistoj" domnumero 1 [20]. Tio estas unu el la plej malnovaj domoj de Alkmaar. Verŝajne oni konstruis ĝin en la jaro 1540. Interne ĝi konsistas nur el

ligno, la murojn oni poste aldonis. 'Kanis' estis plata korbo kiun la enloĝantoj de tiu ĉi strato portis sur la dorso kiam oni almozpetis.

Ni promenas madekstren el "Geest" (Spirito) kaj ni eliras sur "Zevenhuizen" (Sepdomoj), ĉi tie ni iras dekstren. Ni krucas la straton kaj alvenas ĉe "Canadaplein" (Kanadoplaco) [21]. La placo akiris ĝian nomon je la 18a de junio 1945, kiel danko al kanadaj soldatoj ĉar ili partoprenis nian liberigadon en 1945. En la jaro 2000 la placo estis renovigita kaj rekonstruita kiel kulturplaco. Ĉeplaco staras la publika biblioteko, la teatro "De Vest" kaj ankaŭ la urba muzeo[21].

Kiam ni daŭrigas nian promenadon laŭlonge de "Canadaplein", kaj ni atingas ĉe nia dekstra flanko la plej grandan monumenton de Alkmaar, la "Grote Kerk" (Granda Kirko) aŭ "Sint Laurenskerk" (Sankta Laŭrenco)[22]. Sur sabla altaĵo ĝi staras. En la jaro 800 tie ĉi estis kapelo. En 1468 jam estis granda kirko el ligno kun brika turo. Pro ŝtormo la turo disfalis kaj mortigis du monaĥinojn kaj la 'Domo de Dio' detruigis. Du jarojn poste oni komencis la konstruadon de la hodiaŭa preĝejo, kiu estis preta en 1516. En 1638 la urbestro decidis starigi orgenon, kostoj 1.000.000 da guldenoj, sed kontraŭ tiu prezo ĝi nun denove estas unike bela kaj belsona orgeno [22]. En la 80-aj jaroj la orgeno bezonis renovigon, kiu estis preta en 1987. En la 90-aj jaroj oni komencis grandan restaŭradon de la kirko. Oni renovigis la internan kaj la eksteran partojn de la kirko. La renoviĝo jam estis preta de post kelkaj jaroj.

Je la norda flanko de la kirko vi trovas statuon de viro kun saltostango. Tiu montras la urban ĉarpentiston, nomitan Maerten Pieterszoon van der Mey [23]. Dum la batalo kontraŭ la hispanoj li povis transporti el la sieĝanta urbo, kelkajn leterojn, kaŝitajn en sia altostango al la oranĝema vicgeneralulo Diederick van Sonoy. En tiuj leteroj la urbestroj petis inundi la malaltajn kamparojn ĉirkaŭ Alkmaar. Tio okazis, kaj Alva kun sia armeo fuĝis pro la akvo. Alkmaar festas tiun malsieĝigon ĉiujare je la 8a de oktobro.

Ni promenas plue kaj iras maldekstren en "St. Laurensstraat" (Sankta Laŭrencostrato). Ambaŭflanke staras konstruaĵoj de la fama arkitekto A.J. Kropholler. Je la fino de "St. Laurensstraat" ni iras dekstren en "Gedempte Nieuwesloot" (Plenigita Nova Fosaĵo) kaj prenas la unuan straton maldekstren, "Doelenstraat" (Celostrato). Je nia dekstra flanko ni vidas la konstruaĵon "Nieuwe Doelen" (Novaj Celoj) [24]. Pasintecce tio estis kazino de la civilgardio. Konstruita estas ĝi en la deksesaj jarcentoj. Post la restaŭrado en 1968, la Urba Muzeo povis okupi la konstruaĵon, tamen ni nun havas novan muzeon sur la "Canadaplein". Malantaŭ la konstruaĵo situas la "Doelenveld" (Celkampo). En la pasinteco oni uzis ĝin kiel pafekzercejon.

Ni iras returnen kaj forlasas "Doelenstraat" en sudan direkton, trapasas "Gedempte Nieuwe Sloot", trairas "Hoogstraat" (Altstrato) ĝis "Langestraat" (Longa Strato). Iom maldekstre, aliflanke de la strato, staras la Urbodomo de Alkmaar [25]. Ĝia historio komenciĝas ĉirkaŭ la jaro 1500, kiam precize oni konstruis ĝin ne estas klare. Jam en 1500 mankis mono por plibonigi la domon. Tiam kelkaj kirkestroj proponis financan subtenon. Bezonata estis halo por vendi varojn. La subteno estis akceptita. Teksto super le enirejo mencias ke la laboro komenciĝis en 1509. Ĉirkaŭ 1520 la urbodomo estis preta. Post multaj rekonstruadoj oni en 1694 decidis tute renovigi ĝin. En 1890 brulego detruis la orientan halon. En 1912-1914 oni komencis internan restaŭradon. Antaŭ kelkaj jaroj finiĝis la rekonstruo de apudaj domoj, kiuj intertempe ankaŭ estas uzataj de la urbestro, kiel ekzemplo "Moriaanshoofd" (Maŭro kapo) [25e] Tre vidinda estas la konsilantara ĉambro, la halo kun la antikva "Schermerkast" [25a], la poldera ĉambro [25c], la renesancstila ĉambro de la Urbestro kaj Skabenoj [25d], la "Nierop"-ĉambro kun originala ligna plafono kaj antikva meblaro. Multaj stiloj de konstruado prezentiĝas en la urbodomo de Alkmaar. (Se eble vi eniru.)

Ni daŭrigas nian vojon tra "Langestraat". Atentu dumvoje la suprajn partojn de la domoj, kiuj prezentas la stilojn pasintecajn. Ni iras maldekstren en "Van den Boschstraat". Je la fino de tiu ĉi strato ni vidas "Provenhuis van Nordingen/Huis van Achten" [26], nomita laŭ fondinto Johan van Nordingen. Laŭ lia deziro estis en 1656 la jam ekzistanta domo alikonstruita kaj aranĝita kiel domo por ok malriĉaj kaj pliaĝaj viroj. Pro tio la kromnomo "Huis van Achten" (Domo por ok viroj).

Ni iras plue laŭ "Gedempte Nieuwesloot" kaj ni vidas maldekstraflanke "Hof van Sonoy" (Korteto de Sonoy) [27]. Pasintece (ĉirkaŭ la jaro 1400) estis ĉi tie Sankta Maria Magdalena monaĥejo. Post kiam la monaĥejo en 1572 estis propraĵo de la urbo oni decidis loĝigi en tio kelkajn civitanojn kiuj estis sen domo ĉar iliaj domoj estis malkonstruitaj pro la konstruado de la nova urba muro. Post la sieĝo de la hispanoj la korteto estis vendita al Diederick van Sonoy, guberniestro de la Norda regiono. Li loĝis tie ĉi dum kelkaj jaroj. La sekvinta proprietulo estis mag. Willem van Bardes, kiu konstruigis la okflankan turon.

Ni eniras "Magdalenastraton", poste ni prenas la unuan straton dekstren, tio estas "Achterstraat" (Malantaŭstrato) kaj jen ni eliras denove sur "Langestraat". Ĉi tie ni promenas maldekstren kaj tiel ni atingas "Mient" (elarolu 'mint') Tiu nomo signifas "Komuna Herbejo". En la dekdua jarcento tie ĉi estis marĉa lageto. Oni sekigis ĝin por urba pligrandiĝo. Kontraŭe ni vidas tri domojn montrantajn tre belajn fasadojn kiuj datas el la 17a kaj 18a jarcentoj. De maldekstre dekstren; "De Leeuwenburg" (Leona kastelo) [28], "De Kroon" (La Krono) [29] kaj "De Zijdeworm" (La Silkvermo) [30]. La unua estas

konstruita de riĉa alkmarano, s-ro Leeuwenburg, kiu donis sian nomon al la domo en 1731. Lia nomo bildiĝas per du leonoj supre. Rimarkinde estas: la leonoj kuŝas kun iliaj postajoj kontraŭ la urba blazono. Ĉar la proprietulo en 1730 metis konstruplanon antaŭ la urbestro, kiu malaprobis la planon. Nur post la kvara fojo li ricevis permeson por konstrui la domon. S-ro Leeuwenburg estis pro tio tiel malbonhumora ke li metigis la leonojn en tia maleleganta pozo. "De Kroon", 16a-jarcento, montras la urbajn blazonojn de Alkmaar kaj Hoorn, krome du virinajn figurojn; "Justeco" kaj "Espero". Sur la simpla fasado de "Zijdeworm", konstruita en 1672, estas kronita Silkraŭpo.

Maldekstren ni iru al la placo de la fromaĝpesilejo, tio estas nia elirpunkto. Se vi nun estas iom laca: en la apudeco troviĝas diversaj bonkvalitaj agrablaj trinkripezoj. Dorlotu viajn piedojn.

Joh. Heijstra, Heiloo 2001.